

Heinrich Heine,
Die Lorelei

Heinrich Heine,
Lorelej'

*tradukita de Leopold
Elb*

Heinrich Heine,
Lorelay

*tradukita de Hans-
Georg Kaiser*

Heinrich Heine,
Lorelejo

*tradukita de Joachim
Gießner*

*Tiu traduko estas poste
iom modifita de aliu-
loj, ne estas la origina
traduk-versio de Leo-
pold Elb.*

Ich weiß nicht, was soll es
bedeuten,
daß ich so traurig bin;
ein Märchen aus alten
Zeiten,
das kommt mir nicht aus
dem Sinn.

Ne scias mi, kial mi
estas
Malgaja en la kor'.
Antikva fabelo restas
Por ĉiam en mia me-
mor'.

Min kaptas malgaj'
en la koro,
pro kio tia trist'?
Fabel' el antikva foro
ne lasas de mi kun
persist'.

Malgajon mi sentas
en koro,
sed kial tia tim'?
Legendo el pratempa
foro
Vagadas tra mia
anim'.

Die Luft ist kühl und es
dunkelt,
und ruhig fließt der
Rhein;
der Gipfel des Berges fun-
kelt
im Abendsonnenschein.

Vespero jam ekmal-
heliĝas,
Fluadas la Rejn' en
trankvil',
La supro de l' monto
lumiĝas
En vespersuna bril'.

Aere fridetas, trank-
vilas,
malhelas jam la Re-
jn'.
La monto surpinte
brilas
vespere en rava scen'.

Jam fluas la Rejn' en
malhelo,
kaj malvarmetas l'
aer'.
Sed brilas la mont' en
orbelo
pro suna lum' de l'
vesper'.

Die schönste Jungfrau sit-
zet
dort oben wunderbar,
ihr goldnes Geschmeide
blitzet,
sie kämmt ihr goldenes
Haar.

Belega knabino jen
tronas
Kun ora juvelar',
La belan vizaĝon
kronas
Mirinde la ora ha-
rar'.

Tre ĉarma feino sidas,
jen supre por ador';
la ora ornamo ridas;
ŝi kombas harojn el
or'.

Jen supre kabino pro-
vokas
per ora juvelar',
kaj ŝia beleco allogas
kaj ŝia ora harar'.

Sie kämmt es mit golde-
nem Kamme,
und singt ein Lied dabei;
das hat eine wundersame,
gewaltige Melodei.

Ŝi uzas kombilon el
oro
Kaj dume kantas ŝi.
Mirige tuŝas al koro
Sorĉiga la melodi'.

Ŝi kombas per ora
kombilo
kaj kantas kun pasi';
mirigas min la elbrilo
kaj forto de l' melodi'.

Ŝi kombas ĝin, kantas
sorĉige,
sirene kantas ŝi
per neimagebla, miri-
ge
potenca melodi'.

...

...

...

...

Den Schiffer im kleinen Schiffe ergreift es mit wildem Weh; er schaut nicht die Felsen- riffe, er schaut nur hinauf in die Höh.	Kaj sopiregon eksen- tas Ŝipisto dum sia ve- tur’; Rifaron li ne priaten- tas, Al monto rigardas li nur.	Ŝipisto ŝipeton gvi- das, lin kaptas ve’ de ek- zalt’. Li ja la rifojn ne vi- das’, li vidas nur supren sen halt’.	Ŝipiston en eta boato Turmentas koremo- ci’. Ne ĝenas lin rifo- kaskado, rigardas nur supren al ŝi!
--	---	---	---

Ich glaube, die Wellen verschlingen am Ende Schiffer und Kahn; und das hat mit ihrem Singen die Lorelei getan.	Mi kredas, ke dronos finfine Ŝipisto kun sia boat’, Kaj tion kaŭzis feine La Loreleja kantad’.	Mi kredas, ke ondoj tiras la ŝipon funden de l’ Rejn’; kaj tio de l’ kant’ eli- ras de Lorelaj-siren’.	Ĝis tiras kun si al Rejn-fundo la ondoj lin kun boat’. Nun kuŝas li en la profundo pro Loreleja kantad’.
--	--	--	--

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17), publikigita 1823.*

Arg-2-2 (2014-04-23
18:09:02)

Aus dem Werk “Buch der Lieder”, Kapitel “Die Heimkehr”, Abschnitt II. Siehe auch ein <http://gutenberg.spiegel.de> unter: http://gutenberg.spiegel.de/?id=5&x=1131&kapitel=12&hash=eb14eca2272#gb_found. Vidu ankaŭ: http://www.gedichte.vu/?die_lorelei.html. La melodion verkis la komponisto Friedrich Silcher. Vidu la retejon http://www.lieder-archiv.de/die_lorelei-notenblatt_300493.html.

*Traduko de la Germana poemo “Die Lorelei” de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de LEOPOLD ELB (†1912-08.04).*

Arg-2-71 (2005-02-03
19:06:30)

La traduko troviĝas sur paĝo 84 de la lernolibro „Post la kurso“ de Wilhelm kaj Hans Wingen, eldonita de Ludwig Pickel en Nurembergo (Nürnberg), Germanio.

*Traduko de la Germana poemo “Die Lorelei” de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de HANS-GEORG KAISER (Cezar, *1954-05-21).*

Arg-2-564 (2005-02-03
19:18:09)

*Traduko de la Germana poemo “Die Lorelei” de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (*1913-12-23 – †2003-11-25).*

Arg-2-1115 (2010-09-15 12:51:51)

Tiu ĉi poem-traduko aperis en la kantokolekto “Mia kantaro I”, eldonita de Josef Schiffer (Wilstorfstr. 58, D-78050 Villingen-Schwenningen, Germanio, tel. 0049(0)7721-58991; faks. 0049(0)7721-508891, ret-adreso: Josef.Schiffer@t-online.de), n-ro 30. Krome ĝi aperis en la informilo “Fervoja Esperantisto” de Germana Ferjojista Esperanto-Asocio, n-ro 3/2010, sur paĝo 3.